TEJO-aktuale: numero 237, 2010-02

### Konkurso Partoprenu IJK-n 2010

Ni ĝojas anonci ke la fonduso "Partoprenu IJK-n" denove povas helpi al membroj de TEJO partopreni la Internacian Junularan Kongreson - ĉi jare en KUBO!!! Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1041

### 3 semajnoj en Kubo!

En Kubo, ne nur okazos UK kaj IJK!

Krom kursosemajno okazonta antaŭ UK en Havano, la amerika komisiono de ILEI okazigos seminarion por instruistoj en Matanzas, kies informoj estas videblaj en http://www.ameriko.org/eo/node/445. TEJO aktive partoprenos en la programo proponante aktivulan trejnadon, tiel ke ĝi estos ankaŭ interesa por aktivuloj! Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1037

### Senpaga E-ferio en Danio - Roskilde-Festivalo!, 27.6. – 5.7.2010

Venu al Roskilde Festivalo! Senpaga renkontiĝo kun multe da muziko! Kaj iom da laboro! Dana Esperanta Junulara Organizo (DEJO) kaj Festoklubo organizas senpagan esperantistan renkontiĝon en Danio dum Roskilde Festivalo, kiu estas la plej granda muzikfestivalo en Norda Eŭropo. Ĉi-jare ni invitas 100 esperantistojn al festego kun 175 muzikgrupoj. La festivalo okazos inter la 27a de junio kaj 5a de julio 2010. Kontraŭ 24 horoj da laboro dum la festivalo ni provizos al la partoprenantoj: senpagan enirbileton, loĝlokon en tendo kaj vegetaran manĝaĵon. Pliaj informoj kaj aliĝilo troviĝas ĉe http://roskilde.festoklubo.dk

### [DEJ] Nova renkontiĝo: PRINTEMPE 2010, 1-a ĝis 5-a de aprilo 2010

Jam de kelka tempo mi havas la impreson, ke indas aranĝi plian Esperanto-renkontiĝon dum pasko. Kompreneble nun jam iom malfruas por organizi tion. Evidentiĝis tamen, ke ankoraŭ liberas loko en la regiono Akeno/Kolonjo/Eifel. Krome jam 22 homoj informis nin, ke ili verŝajne aŭ eble partoprenos en nia nova renkontiĝo PRINTEMPE. La plimulto de la interesitoj venas el eksterlando kaj do estiĝos bele internacia etoso, kiel kutime ĉe la EsperantoLand-renkontiĝoj. Mi planas kunveni dum la kernaj festaj tagoj de pasko, do de ĵaŭdo, 1-a, vespere, ĝis lundo, 5-a de aprilo 2010, posttagmeze. Se estos sufiĉa intereso, ni povos longigi la kunvenon.

Se vi interesiĝas, eble ĵetu rigardon al nia retpaĝo http://esperantoland.org/printempe/index.shtml#printempe , kie mi prezentis interalie, kial indas aldoni plian renkontiĝon. Se vi ŝatus eventuale partopreni en la nova renkontiĝo de EsperantoLand dum pasko, bv. respondi per la suba respondilo aŭ per nia kontaktformularo indikita en la retpaĝo - prefere relative baldaŭ. Aliĝilo pretiĝos dum la venontaj tagoj.

### Projekto RoMEo serĉas kuneldonisto(j)n por nova komikslibreto.

Jam eldoninte du komikslibretojn (Rat-Man kaj Diabolik), projekto RoMEo nun serĉas ajnan nacian asocion aŭ lokan grupon por kune daŭre riĉigi la komiksan fakon de esperantista literaturo (kaj, ankaŭ, iom la poŝoj de tiu asocio/grupo). Ĉi-foje, verŝajne, post la krimoj de Diabolik, oni revenos al la ridema flanko de la vivo, pere de la amuzegaj bildstrioj de Lupo Alberto, kies aventuroj jam publikiĝis en multaj landoj. Asocio aŭ klubo, kiu dezirus ilin eldoni kune kun IEJ kaj Edistudio, kiuj jam pretas komenci, bonvolu rapide sin anonci rekte al la retadreso daniele.binaghiĈEesperanto.it
Daniele BINAGHI, projektestro RoMEo
pluaj informoj: http://www.pecorElettriche.it/Esperanto/RoMEo kaj http://www.lupoalberto.it/

### Esperanto.com

Estis lanĉita nova virtuala komunumo de esperantistoj: http://esperanto.com/. Ĝi ankaŭ enhavas grupon de TEJO.

### Kandidatiĝu por Komitataneco B de TEJO

Venas la tempo por kandidatiĝi kiel Komitatano B de TEJO por la oficperiodo de la 1-a de junio 2010 ĝis la 31-a de majo 2012. Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1042

### la 21-a IJS en Pécs

La 21-a Internacia Junulara Semajno (IJS) 2010 okazos en Pécs <"peĉ">, Hungario, inter la 3-a kaj 9-a de aŭgusto. Ĉu vi ŝatus havi neforgeseblan someron, amuziĝi kaj interkonatiĝi kun aliaj esperantistoj? Ne forgesu ke la paglimdato de la unua periodo de IJS 2010 antaŭpago
estas la 15-a de februaro! Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1044

### [tejo] PS2010: papera versio aĉetebla

La papera versio de Pasporta Servo nun disponeblas en la libroservo de UEA, kaj baldaŭ aliloke:
http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=3474
Plej amike, Aleks

### Venontaj renkontiĝoj

June (nur 100-jare), sune, kune - Itala Esperanto-Kongreso ek de la 21-a de aŭgusto 2010 apud Venecio
http://italakongreso.esperantoitalia.it/;

INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO 2010: JE PASKO EN TRENTINO, LA PLEJ MOJOSA REGIONO DE ITALIO!
http://iej.esperanto.it/ijf/2010/index.eo.php;

Komuna Franca kaj 87a Germana Esperanto-Kongreso, 21a ĝis 24a majo (pentekosto), Kaiserslautern Germanio
Pliaj informoj: http://esperanto-france.org/kaiserslautern2010 (france),
http://esperanto.de/gea/anmeldung_dek.html (germane);

Beneluksa Kongreso, 13a ĝis 16a de Majo, Antverpeno, Belgio, Beneluksa Esperantokongreso kun Lingva Festivalo pri regionaj lingvoj (Frisa, Pikarda, Valona, ...) Ĉefa indeksa paĝo por la Kongreso de 2010: www.esperanto.be;

9. Kekso en Hamburg, 02.04. - 05.04.2010 (Germanio) http://www.esperanto.de/kej/kekso_e.html;

Blue floras la genciano 6 (Amuza junulara semajnfino) La Esperanto-junularoj de Baden-Virtembergo kaj Aŭstrujo invitas vin. 02.06 – 06.06.2010, Pliaj informoj kaj ALIĜILO: Inge Simon, Brünner Str. 20, D-73431 Aalen, Tel: 0049/7361/360615 (poŝtelefono: 0049/170/4739318), Retpoŝto:Inge.Simon ĉe esperanto.de;

HEJ invitas al IJS, de la 3-a ĝis la 9-a de aŭgusto, en la urbo Pécs http://www.ijs.hu/?q=eo/IJS-2010_;

1-a PRINTEMPE, 2-a - 6-a de apr. 2010, supozeble en Eifel-montaro http://www.esperantoland.org/printempe/;

8-a SOMERE, 23-a de julio - 6-a de augusto 2010 en Jünkerath/Eifel http://www.esperantoland.org/somere/;

9-a Novjara Renkontigho (NR), 27a de dec. 2010 - 3a de jan. 2011 supozeble en Saarbrücken
http://www.esperantoland.org/nr/;

2-a Novjara Internacia Semajno (NIS) por junuloj kaj junaj plenkreskuloj (ch. 14 - 30jaraj) 27-a de dec. 2010 - 3-a de jan. 2011 supozeble en Saarbrücken http://www.esperantoland.org/nis/;

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu

### Konkurso Partoprenu IJK-n 2010

Ni ĝojas anonci ke la fonduso "Partoprenu IJK-n" denove povas helpi al membroj de TEJO partopreni la Internacian Junularan Kongreson - ĉi jare en KUBO!!! Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1041

### 3 semajnoj en Kubo!

En Kubo, ne nur okazos UK kaj IJK!

Krom kursosemajno okazonta antaŭ UK en Havano, la amerika komisiono de ILEI okazigos seminarion por instruistoj en Matanzas, kies informoj estas videblaj en http://www.ameriko.org/eo/node/445. TEJO aktive partoprenos en la programo proponante aktivulan trejnadon, tiel ke ĝi estos ankaŭ interesa por aktivuloj! Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1037

### Senpaga E-ferio en Danio - Roskilde-Festivalo!, 27.6. – 5.7.2010

Venu al Roskilde Festivalo! Senpaga renkontiĝo kun multe da muziko! Kaj iom da laboro! Dana Esperanta Junulara Organizo (DEJO) kaj Festoklubo organizas senpagan esperantistan renkontiĝon en Danio dum Roskilde Festivalo, kiu estas la plej granda muzikfestivalo en Norda Eŭropo. Ĉi-jare ni invitas 100 esperantistojn al festego kun 175 muzikgrupoj. La festivalo okazos inter la 27a de junio kaj 5a de julio 2010. Kontraŭ 24 horoj da laboro dum la festivalo ni provizos al la partoprenantoj: senpagan enirbileton, loĝlokon en tendo kaj vegetaran manĝaĵon. Pliaj informoj kaj aliĝilo troviĝas ĉe http://roskilde.festoklubo.dk

### [DEJ] Nova renkontiĝo: PRINTEMPE 2010, 1-a ĝis 5-a de aprilo 2010

Jam de kelka tempo mi havas la impreson, ke indas aranĝi plian Esperanto-renkontiĝon dum pasko. Kompreneble nun jam iom malfruas por organizi tion. Evidentiĝis tamen, ke ankoraŭ liberas loko en la regiono Akeno/Kolonjo/Eifel. Krome jam 22 homoj informis nin, ke ili verŝajne aŭ eble partoprenos en nia nova renkontiĝo PRINTEMPE. La plimulto de la interesitoj venas el eksterlando kaj do estiĝos bele internacia etoso, kiel kutime ĉe la EsperantoLand-renkontiĝoj. Mi planas kunveni dum la kernaj festaj tagoj de pasko, do de ĵaŭdo, 1-a, vespere, ĝis lundo, 5-a de aprilo 2010, posttagmeze. Se estos sufiĉa intereso, ni povos longigi la kunvenon.

Se vi interesiĝas, eble ĵetu rigardon al nia retpaĝo http://esperantoland.org/printempe/index.shtml#printempe , kie mi prezentis interalie, kial indas aldoni plian renkontiĝon. Se vi ŝatus eventuale partopreni en la nova renkontiĝo de EsperantoLand dum pasko, bv. respondi per la suba respondilo aŭ per nia kontaktformularo indikita en la retpaĝo - prefere relative baldaŭ. Aliĝilo pretiĝos dum la venontaj tagoj.

### Projekto RoMEo serĉas kuneldonisto(j)n por nova komikslibreto.

Jam eldoninte du komikslibretojn (Rat-Man kaj Diabolik), projekto RoMEo nun serĉas ajnan nacian asocion aŭ lokan grupon por kune daŭre riĉigi la komiksan fakon de esperantista literaturo (kaj, ankaŭ, iom la poŝoj de tiu asocio/grupo). Ĉi-foje, verŝajne, post la krimoj de Diabolik, oni revenos al la ridema flanko de la vivo, pere de la amuzegaj bildstrioj de Lupo Alberto, kies aventuroj jam publikiĝis en multaj landoj. Asocio aŭ klubo, kiu dezirus ilin eldoni kune kun IEJ kaj Edistudio, kiuj jam pretas komenci, bonvolu rapide sin anonci rekte al la retadreso daniele.binaghiĈEesperanto.it
Daniele BINAGHI, projektestro RoMEo
pluaj informoj: http://www.pecorElettriche.it/Esperanto/RoMEo kaj http://www.lupoalberto.it/

### Esperanto.com

Estis lanĉita nova virtuala komunumo de esperantistoj: http://esperanto.com/. Ĝi ankaŭ enhavas grupon de TEJO.

### Kandidatiĝu por Komitataneco B de TEJO

Venas la tempo por kandidatiĝi kiel Komitatano B de TEJO por la oficperiodo de la 1-a de junio 2010 ĝis la 31-a de majo 2012. Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1042

### la 21-a IJS en Pécs

La 21-a Internacia Junulara Semajno (IJS) 2010 okazos en Pécs <"peĉ">, Hungario, inter la 3-a kaj 9-a de aŭgusto. Ĉu vi ŝatus havi neforgeseblan someron, amuziĝi kaj interkonatiĝi kun aliaj esperantistoj? Ne forgesu ke la paglimdato de la unua periodo de IJS 2010 antaŭpago
estas la 15-a de februaro! Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1044

### [tejo] PS2010: papera versio aĉetebla

La papera versio de Pasporta Servo nun disponeblas en la libroservo de UEA, kaj baldaŭ aliloke:
http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=3474
Plej amike, Aleks

## Venontaj renkontiĝoj

June (nur 100-jare), sune, kune - Itala Esperanto-Kongreso ek de la 21-a de aŭgusto 2010 apud Venecio http://italakongreso.esperantoitalia.it/;

INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO 2010: JE PASKO EN TRENTINO, LA PLEJ MOJOSA REGIONO DE ITALIO! http://iej.esperanto.it/ijf/2010/index.eo.php;

Komuna Franca kaj 87a Germana Esperanto-Kongreso, 21a ĝis 24a majo (pentekosto), Kaiserslautern Germanio Pliaj informoj: http://esperanto-france.org/kaiserslautern2010 (france), http://esperanto.de/gea/anmeldung_dek.html (germane);

Beneluksa Kongreso, 13a ĝis 16a de Majo, Antverpeno, Belgio, Beneluksa Esperantokongreso kun Lingva Festivalo pri regionaj lingvoj (Frisa, Pikarda, Valona, ...) Ĉefa indeksa paĝo por la Kongreso de 2010: www.esperanto.be;

9. Kekso en Hamburg, 02.04. - 05.04.2010 (Germanio) http://www.esperanto.de/kej/kekso_e.html;

Blue floras la genciano 6 (Amuza junulara semajnfino) La Esperanto-junularoj de Baden-Virtembergo kaj Aŭstrujo invitas vin. 02.06 – 06.06.2010, Pliaj informoj kaj ALIĜILO: Inge Simon, Brünner Str. 20, D-73431 Aalen, Tel: 0049/7361/360615 (poŝtelefono: 0049/170/4739318), Retpoŝto:Inge.Simon ĉe esperanto.de;

HEJ invitas al IJS, de la 3-a ĝis la 9-a de aŭgusto, en la urbo Pécs http://www.ijs.hu/?q=eo/IJS-2010_;

1-a PRINTEMPE, 2-a - 6-a de apr. 2010, supozeble en Eifel-montaro http://www.esperantoland.org/printempe/;

8-a SOMERE, 23-a de julio - 6-a de augusto 2010 en Jünkerath/Eifel http://www.esperantoland.org/somere/;

9-a Novjara Renkontigho (NR), 27a de dec. 2010 - 3a de jan. 2011 supozeble en Saarbrücken http://www.esperantoland.org/nr/;

2-a Novjara Internacia Semajno (NIS) por junuloj kaj junaj plenkreskuloj (ch. 14 - 30jaraj) 27-a de dec. 2010 - 3-a de jan. 2011 supozeble en Saarbrücken http://www.esperantoland.org/nis/;

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu